La novaj kurac-metodoj kontraŭ la Korona Virusa Malsano 2019 (KOVIM-19)

(El Nacia Komisiono pri Sano de Ĉina Popola Respubliko en la sesafoja publikigo)

La Protokolo pri Diagnozado kaj Kuracado de la Korona Virusa Malsano 2019 (KOVIM-19) (el Nacia Komisiono pri Sano de Ĉina Popola Respubliko en la sesafoja publikigo) estis jam publikigata kaj estas direktanta medicinistojn en kliniko al pli efikaj kaj senprokrastaj kuracoj de la Korona Virusa Malsano 2019. La protokolo estis formata de la plej aŭtoritataj kaj spertoriĉaj medicin-specialistoj en Ĉinio kaj ĝi reflektas la plej altajn kuracajn nivelojn kaj fak-teknikajn postulojn kontraŭ la Korona Virusa Malsano 2019 nuntempe kaj en Ĉinio.

Aliflanke la protokolo rezultis el klinikaj praktikadoj, teoriaj aplikadoj kaj spertaj resumoj de la medicin-specialistoj en Ĉinio kaj tiamaniere ĝi posedas efikojn kaj utilecojn por kontraŭ la Korona Virusa Malsano 2019, minimume nuntempe kaj en Ĉinio, kio rimarkigas al ni ĝui kune kaj esplori plue.

La protokolo proponas la jenajn konkretajn kurac-metodojn kaj kurac-rimedojn.

1. Fosfora klorokuino (Chloroquine phosphate)

500mg dufojojn ĉiutage por la plenaĝulo.

2. Arbidolo(Arbidol)

200mg trifojojn ĉiutage por la plenaĝulo.

3. Ribavirino (Ribavirin) kune kun interferono aŭ Lopinaviro (Lopinavir) /Ritonaviro (Ritonaviro).

Tiuj aplik-periodoj tute ne superas 10 tagojn.

La protokolo proponas plue taksi efikojn de la nuntemp-provataj medikamentoj.

La protokolo proponas ne samtempe apliki pli ol tri specojn de la medikamentoj kaj haltigi aplikadojn tuj post ol neeltenataj kromefikoj aŭ toksefikoj okazas.

4. La kurac-rimedo per plasmoj.

Se eble, tio estas konsiderinda, ke kuraci seriozajn aŭ danĝer-seriozajn kazojn kun rapidaj evoluoj per plasmoj de resaniĝintoj dum la resaniĝ-periodoj. Koncernaj aplik-metodoj kaj aplik-dozoj povas esti adoptataj laŭ la **"La Protokolo** pri **Klinikaj Kuracadoj de la Korona Virusa Malsano 2019 per Plasmoj de Resaniĝintoj dum la Resaniĝ-Periodoj"** (la unuafoja publikigo) .

5. la aliaj kurac-rimedoj.

La eksterkorpaj sang-purigaj teknikoj, kiel plasm-interŝanĝiĝo, plasm-sorbado, plasm-transfuzo, sanga/plasma trafiltriĝo ktp. por danĝer-seriozaj kazoj kun altaj inflam-reakcioj.

6. TĈM-aj kuracadoj

TCM-aj kuracadoj (en la Protokolo pri Diagnozado kaj Kuracado de Korona Virusa Malsano 2019 , je la sesafoja publikado) estis iagrade reviziataj en la sindrom-tipoj, sindrom-periodoj, rekomentataj receptoj, preparitaj drogoj kaj iliaj aplik-metodoj kaj aplik-dozoj ktp..

La protokolo (je la sesafoja publikado) rimarkigas ke ĉiu devas distingi individue kaj kuraci ekzakte laŭ diferencaj malsanecoj, tiealokaj klimat-karakteroj kaj diferencaj konstitucioj, konsultante la protokolon.

Detale konsulti la parton de la protokolo pri TCM-aj kuracadoj (en la alia artikolo en E-o).

Tradukata de Wang Disheng, ĈMEA
2020-02-27